
# starto

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



ANTVERPENO
URBO DE LA 67A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

1982 · 4 · (92)




# Renkonte al la Monda Packongreso en Prago 1983!

Venontjare en junio nia ĉefurbo Prago bonvenigos partoprenantojn de la Tutmonda Kongreso de Pacbatalantoj. De la 15 - a ĝis la 20 - a de la plej bela monato en jaro traktos delegotaj viroj kaj virinoj bazajn demandojn de nia vivo: ĉu la homa socio faris ĉion por interkomprenigo de la nacioj, por la paco?

Nia lando jam pli ol tridek sep jarojn ĝuas pacon - sed ne ĉie en la mondo regas paca kunlaboro. Ni bone memoras militojn en Koreujo, en Vjetnamio, Kampuĉio; propraokule ni observas genocidojn en Ĉilio, Salvadoro kaj Libano; ni auskultas raportojn pri amasigo de armiloj en Usono kaj en landoj de la NATO-organizaĵo.

Ni esperantistoj jam aldonis niajn voĉojn kaj subskribojn al la protestoj kontraŭ la sensenca vetarmado kaj produktado de teruraj armiloj - ni eĉ ne scias, kiel ili ĉiuj nomiĝas: ĉu Pershing aŭ Leopardo... Ni ĉiuj jam kontraŭstaris decidon de usona prezidento Ronald Reagan produkti la neŭtronbombon, ĉar ni deziras feliĉon por ni mem kaj por niaj infanoj! - Tial ni denove aldonos nian manon por diligenta laboro - por nuligi militojn, por ligi amikajn kontaktojn inter homoj en la tuta mondo, por krei interkompreniĝon inter ĉiuj popoloj kaj homaj rasoj - ni ĉiuj helpos konstruadon de la eterna paco sur nia planedo.

Ni esperantistoj povas fari multon!

Ni p o v a s , ĉar ni jam konas ideon de la interkompreniĝo inter ĉiuj homoj - per unu internacia lingvo ESPERANTO - ponto inter la diverslingvaj nacioj. Ni konas devizon: PER ESPERANTO POR LA MONDPACO!

Sed ĉu ni ankaŭ scias, ke nur pere de la mondpaco eblas disvastigo de Esperanto?!

KION NI FARU NUN POR LA MONDPACO?

Ni agu laŭ niaj fortoj! - Ĉiu povas fari ion por montri, ke ni, la ĉeĥoslovakaj civitanoj, amas la pacon, ke ni ne volas - ke ni eĉ kondamnas militojn!

KIEL ?

* Ni skribu al niaj gekorespondamikoj - kien ajn - ju pli malproksimen de nia ŝtatlimo des pli bone - ke ni militon ne bezonas, ke ni ĝin ne volas, ke ni ĝin malamas, kaj ke ni kontraŭstaras produktadon de la amas-detruiloj, rakedoj, bombaviadiloj, atom- kaj neŭtronbomboj.
* Ni skribu al niaj geamikoj eksterlanden, ke en nia ĉefurbo okazos venontjare la Tutmonda Kongreso de Pacbatalantoj - ni informu ilin pri tiu ĉi multsignifa evento.
* Ni trovu kontaktojn - se ni ankoraŭ ne havas ilin - kun ŝtataj, distriktaj aŭ urbaj Packonsilantaroj; ni proponu al ili nian helpon, kunlaboron!
* Ni preparu kaj forsendu salutleterojn, en kiuj ni deziru sukceson dum la traktado al la delegitoj de la Kongreso.
* Ni ornamu niajn propagandilojn kaj vitrinojn okaze de la Kongreso, ni informu la neesperantistan publikon, ke la esperantistoj bone konas signifon de la Kongreso!
* Ni organizu ankaŭ aliajn aranĝojn, ni partoprenu pacmarŝojn, pacmanifestaciojn kaj packunvenojn!

Ĉiu nia vorto esprimu:

ESPERANTO - INTERKOMPRENIĜO - AMIKECO - PACO

# Proklamo

de ĉeĥaj esperantistoj okaze de la 40-a datreveno de ekstermo de L i d i c e

Okaze de 40-a datreveno de la tragedio de Lidice kunvenis ĉeĥaj esperantistoj la 19-an de junio en Kladno por honorigi la memoron de mortorturitaj viroj, virinoj kaj infanoj per hitleranoj.
Ni klinas niajn kapojn super la eksterordinara heroeco de tiu ĉi malgranda komunumo en la regiono de Kladno.
La krimon, kiun faris la faŝistoj 10-an de junio 1942 la mondo neniam forgesos. Tiu ĉi krimo alarmigas konsciencon de la homaro al pli forta rezisto kontraŭ faŝismo kaj kontraŭ ĉiuj fortoj de milito kaj perforto.
Lidice ĉiam pli akcente avertas, ĉar faŝismo en diversaj formoj kaj aspektoj vivas tutmonde.
Se la homaro ĉesus komunan kontraŭstaron al fortiĝanta danĝero de nuklea milito, en nelonga tempo estus en la mondo miloj, jes centmiloj da Lidice el la jaro 1942-a.
Sincere kaj honeste ni viciĝas sub la pacproponojn de Sovetunio, kiujn esprimis ne sole en la nomo de sovetiaj homoj, sed ankaŭ en la nia L. I. Breĵnev.
La eventoj de Lidice nin devigas per ĉiuj fortoj ne permesi al sangosoifaj akcipitroj el NATO alpreni la mondpotencon.
La Parko de paco kaj amikeco en Lidice daŭre estu signo por monda solidareco kaj sopiro de ĉiuj homoj pri amikeco kaj la mondpaco.
Ni, ĉeĥaj esperantistoj en ĉiutaga nia laboro kaj agado en kadro de esperantista movado estos senlacaj batalantoj por la mondpaco kaj interkompreniĝo inter la popoloj.

En Kladno la 19-an de junio 1982





## 67-a UK en Antverpeno finis

Dum la Kongreso oficiale reprezentis nian Asocion ĝia prezidanto D-ro Jermář, ĝia sekretario Zd. Křimský kaj junularan sekcion M. Vančurová.
La veturo al Antverpeno estis interesa, sed ankaŭ sufiĉe pena por la ŝoforo de aŭtomobilo, en kiu la reprezentantoj veturis. Survoje helpis pluraj geesperantistoj, kelkaj proponis eĉ la tranokton ekz.s-ano Fischer el Nordwalde /FRG/aŭ geedzoj Partecke el Eisenach /GDR/ kaj tiel ni sukcesis rapide traveturi pli ol 2600 kilometrojn.
La kongreson partoprenis 1900 esperantistoj el 52 landoj. Kongreso, kies ĉefa temo estis Generaciaj aspektoj de Esperanto - Movado, traktis ankaŭ pri multaj aliaj temoj. Entute estis preparitaj 163 diversspecaj kunvenoj, programoj kaj aranĝoj.



Tre interesa estis kultura parto de la kongreso - teatroj, koncertoj, belartaj konkursoj, ekspozicioj, ekskursoj ktp. La organizo estis laŭ niaj spertoj ankaŭ ege bona.
La unua foto prezentas parton de nia trimembra delegitaro ĉe s-ano J.Fischer, sur dua foto parto de giĉetoj.
Tre interesa estis dum la inaŭguro de la kongreso speciala mesaĝo de membro de UNESCO-komisiono CIC s-ro Masmoudi Mustapha, kiu parolis pri la problemoj de monda komunikado. Ni preparos lian prelegon aldone al asocia informilo "Informace" por la funkciuloj de asociaj sekcioj kaj lokaj grupoj. Interesuloj pri la prelego serĉu ĝin tie.
Dum la kongreso ankaŭ traktis CK de UEA en kiu ĈEA havas du voĉojn. Laboroj de la komitato estis bone preparitaj kaj de la UEA-estraro gvidataj. /Parton vi vidas sur la tria foto/. Pri la kongreso interesiĝis belgaj gazetoj, radio kaj TV, kiuj ĉiutage prezentis al la publiko informojn, intervjuojn kaj raportojn el la kongresa tereno.
Kongresa balo kun bunta programo ne povis ja manki. Ĉarma estis baleta enkonduko /foto 4-a/. La atmosfero estis ege gaja /foto 5a/ Reprezentantojn de diversaj landoj akceptis la urbestro kaj ankaŭ provincestro. Dum paŭzoj regis viglaj diskutoj kaj interparoloj /foto 6-a/ĉu sur la podio, ĉu en la salono /foto 7-a, 8-a/.
Porinforme nur: la kongresa salono estis en antverpena kultura domo proksime de zoo-ĝardeno. Bedaŭrinde iom droniĝis la kongresa reklamo inter pluaj aliaj aranĝoj /foto 9-a/. Dum libera tempo ni vizitis ankaŭ Bruselon kaj povis admiri belegan arkitekturon de mezepoka urba centro /foto 10-a/. En la ĉefa stacidomo nin feste akceptis la staciestro, ankaŭ esperantisto.
Rezulte estis akceptitaj 4 rezolucioj, kies plenan tekston vi legu alipaĝe.
Estas bone, ke sekva 68-a kongreso denove estos en la lando, kien ni povos veturi pli facile: de 30-a julio ĝis 6-a de aŭgusto 1983 en Budapeŝto. Nia asocio organizos aŭ pere de ia agentejo aŭ rekte helpe de asociaj komisionoj kaj sekcioj vojaĝon de interesuloj. Sur aldonita aliĝilo jam nun esprimu vian deziron. Poste vi ricevos ĉiujn koncernajn informojn.

① 


② 



4



5



6



7

8



9






10

KONGRESA REZOLUCIO PRI LA INTERNACIA JARO DE LA JUNULARO

La 67-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 24-a ĝis la 31-a de julio 1982 en Antverpeno kun 1900 reprezentantoj el 51 landoj kun granda intereso kaj apogo

notas, ke Unuiĝintaj Nacioj deklaris 1985 Internacia Jaro de la Junularo, konsciante ke ekzistas tuta serio de gravaj problemoj, kiujn nepre devas pritrakti la tuta socio koncerne la junularon;

konstatas, ke nuntempe en la socio la homaro troviĝas ĉe vojkruciĝo, en la senco ke la mondo fariĝas ĉiam pli integrita, kaj la ligoj inter la diversaj nacioj je ĉiuj niveloj fariĝas tiel intensaj, ke estas aparte grave eduki la junularon al kompreno de tiuj interrilatoj;

konscias, ke la teknika evoluo donas al la homaro la eblecon detrui sin mem; samtempe atentigas pri la neceso pliprofundigi la kompreniĝon inter la generacioj, ĉar ĉiuj generacioj povos alporti siajn spertojn kaj lertojn;

substrekas la fundamentan bezonon krei kompreniĝon inter la nacioj kaj inter la kulturoj kaj subteni ĉiujn aktivecojn kondukantajn al paco kaj malarmado.

Pro tio rekomendas ke la studprogramoj en la lernejoj, universitatoj kaj aliaj klerigejoj aparte emfazu la edukon al respondeco, uzo de la teknologio por la homa progreso kaj interkompreniĝo kaj toleremo; oni unuflanke emfazu la samecon de la homoj kaj la komunajn atingojn de la civilizo, kaj aliflanke oni emfazu la kulturajn diferencojn ĉar ĝuste ili estas riĉaĵo de la nuna mondo kaj pro tio konservindaj por eviti teknologian homogenigon.

Fine emfazas la rolon de Esperanto en ĉio ĉi: unue kiel edukilo, ĉar ĝi kreas la kondiĉojn en kiu vera kultura interkompreniĝo estas ebla kaj en kiu la spirito de toleremo povas ekesti; due kiel komunikilo pri la problemo mem, ĉar Esperanto formas idealan bazon por pridiskuti ĉi-tiujn demandojn.

Tial ĝi 1/ rekomendas al ĉiuj E-organizoj kunlabori kun la junulara sekcio de UEA /TEJO/ kaj kun aliaj esper. kaj neesperantistaj organizoj en la realigo de la Internacia Jaro de Junularo, 2/ proponas al UNO, UNESCO kaj aliaj kunlaborantaj organizoj en la I.J.J. praktike esplori la valoron de E-o en la interkompreniĝo de monda junularo.

KONGRESA REZOLUCIO PRI TURISMO

La 67-a Universala Kongreso de Esperanto atentigas pri la rekomendo, entenita en la Manila Deklaracio pri monda turismo, ke estu kuraĝigita la lernado de lingvoj, "ĉefe de tiuj kun universala destino, kiel Esperanto" por faciligi la kontaktojn inter la vizitantaj turistoj kaj la vizitataj popoloj; memorigas la servojn, kiujn Esperanto, pro sia facileco kaj neŭtraleco, povas alporti al la internacia turismo, en la spirito de tutmonda alproksimiĝo, kiun karakterizas la Manila Deklaracio; konstatas, ke Esperanto jam de pluraj jaroj estas utiligata de la ŝtataj kaj aliaj turismaj oficejoj por la turisma informado, ĉefe sub formo de eldono de filmoj, gvidlibroj, broŝuroj kaj afiŝoj en Esperanto; esprimas la deziron, ke la ŝtatoj-partoprenantoj en la Monda Turisma Kunveno en Acapulco kuraĝigu la utiligon de la Internacia Lingvo por turismaj celoj.

## KONGRESA REZOLUCIO PRI LA MONDA ASEMBLEO PRI MALJUNIĜO

La 67-a Universala Kongreso de Esperanto notas, ke samtempe kun la Kongreso, en Vieno okazas Monda Asembleo pri Maljuniĝo, kunvokita de Unuiĝintaj Nacioj; informas, ke lige al tiu asembleo kaj por kontribui al ĝi, la Kongreso donis apartan atenton

- al la problemo de maljuniĝo, speciale pri la situacio de pli aĝaj personoj en la Esperanto-movado,
- al la kontribuo, kiun la Internacia Lingvo Esperanto povas doni por la pliriĉigo de la kultura vivo de maljunaj personoj;

substrekas, ke la maljunuloj troviĝas en unika socia situacio pro la progreso de la medicino, kiu plilongigas ilian atendeblan vivodaŭron, tiel ebliganta al ili aktive agadi interne de la propra socio sen profesiaj devoj kaj samtempe plue kleriĝi kaj edukiĝi; konstatas, ke la maljunuloj en la rapide ŝanĝiĝanta mondo estas je unu flanko certagrade izolitaj, sed aliflanke disponas pri aparte valoraj vivospertoj, kiujn ili devus povi transdoni al aliaj generacioj; atentigas, ke tiu generacio tute aparte povas kulture riĉiĝi sian vivon pere de la Internacia Lingvo Esperanto, kiu pro ĝia relativa facileco kaj tutmonda disvastigiteco unike taŭgas por esti utiligata de la maljunaj homoj; invitas - la instancojn de Unuiĝintaj Nacioj, Unesko kaj aliajn internaciajn registarajn organizaĵojn daŭre okupiĝi pri la problemoj de maljunuloj, - la organizaĵojn okupiĝantajn pri la problemoj de maljunuloj kunlabori kun Universala Esperanto - Asocio pri utiligo de Esperanto por faciligi al la organizaĵoj la internacian komunikadon kaj por riĉigi la vivon de la maljunuloj, - la Landajn kaj Fakajn Asociojn kontribui al la realigo de ĉi tiu rezolucio.

## KONGRESA REZOLUCIO PRI MONDA KOMUNIKA JARO

La 67-a Universala Kongreso de Esperanto notas kun kontento, ke la jaro 1983 estas deklarita de la Asembleo de UN "Monda Komunika Jaro: Evoluigo de Substrukturoj"; konsideras, ke la evoluo de komunika teknologio povas kaj devas servi la demokratian informinterŝanĝon en la servo de la homa progreso internaciskale; konstatas, ke la flankoj de komunikado teknika kaj socia ne estas disigeblaj, sekve rekomendas al organizaĵoj interesitaj en la komunikado doni pli da atento al la sociaj kaj lingvaj dimensioj de la internacia komunikado; subtenas en tiu senco la aktivecon de Unesko, kaj taskas UEA - surbaze de aparta laborplano - kunlabori kun interesitaj internaciaj neregistaraj organizaĵoj por komune konsciigi la mondan publikon pri la lingvaj aspektoj de komunikado kaj konvinki pri tio la instituciojn, kiuj evoluigas la Mondan Komunikan Jaron, speciale la Internacian Telekomunikan Union kaj Uneskon.









# SAEST '82

En České Budějovice /13-15 08 1982/ okazis Seminario pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko, kiun partoprenis 72 personoj el 8 landoj /Aŭstrio, Bulgario, ĈSSR, Federacia Resp.Germanio, Germana demokratia respubliko, Hungario, Jugoslavio kaj Sovetunio/. UEA estis reprezentita far inĝ. P. Todorov, estrarano komisiita pri faka agado kaj ISAE far ĝia ĝenerala sekretario inĝ. Ch. Darbellay.

Pri la seminaria ĉeftemo "Energio - la tutmonda problemo" estis prezentitaj 17 prelegoj far aŭtoroj el 5 landoj; pri la problemoj de la faka lingvo kaj traduko estis prezentitaj 4 prelegoj far aŭtoroj el 3 landoj.

Prelegtekstoj estas publikigitaj en la speciala almanako /aĉetebla ĉe ĈEA, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1 - por 24,50 Kčs/.

## D E K L A R O

de la partoprenantoj de SAEST '82 en České Budějovice, ĈSSR

La 72 partoprenantoj /devenantaj el 8 landoj/ de la Seminario pri apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko en České Budějovice aŭskultis prelegojn pri la ĉefa temo de la Seminario "Energio - la tutmonda problemo". En la prelegoj estis pritaksataj problemoj ligitaj al la produktado, racia kaj ŝparа uzado de la energio.

La problemo "Energio" restos daŭre en la sfero de intereso de la esperantistaj fakuloj ankaŭ pro tio, ke Esperanto celas ŝpari al la homaro energion de la plej alta rango, energion de la homa cerbo, kiu estas nun - en la tempo de la konfuza multlingveco - tiel neracie disipata.

La partoprenantoj proponas:

- ke pro graveco de la problemo estu kreita intensa internacia kunlaboro plejeble en la formo de internacia laborgrupo por energio;
- ke la faka agado de UEA, SEC kaj ISAE unuiĝu por akceli uzon de Esperanto sur la scienca kaj teĥnika terenoj;
- ke la revuoj regule diskonigu informojn pri la entreprenataj agadoj, kio ebligos eviton de duobla aŭ eĉ plurobla laboro en la movado;
- ke la scienca-teĥnika sekcio de ĈEA daŭrigu aranĝadon de la seminarioj dediĉitaj ĉiam al iu grava ĝenerala temo;
- ke UEA, en la sfero de sia faka programo subtenadu la agadon de sciencaj kaj fakaj aplikoj de Esperanto ne nur morale, sed ankaŭ materie.

České Budějovice la 15-an de aŭgusto 1982

SET

LANČOV



UNUA VICPREZIDANTO DE ĈEA (MALDEKSTRE) TRANSDONAS ASOCIAN DONACON AL KLUBESTRO DE LOKA E-KLUBO EN TŘEBÍČ (LA KLUBO ORGANIZAS SET.)

## TRIDEKJARA

Oni volas eĉ ne kredi, ke la Somera Esperanto - Tendaro en Lančov, kiu ĉiujare allogas interesulojn pri la Internacia Lingvo el tuta Ĉeĥoslovakio kaj el multaj aliaj landoj, festas ĉi-jare jam sian 30-an jariĝon. Alrememorigis tion la solena vespero, kiu okazis la 30-an de julio en la kultura domo en Lančov. La intiman solenon ĉeestis pluraj membroj de Esperanto-Klubo en Třebíč, kiu prizorgas la tendaron dum ĝia tuta ekzisto, reprezentantoj de institucioj, kiuj kunlaboras kun EK Třebíč kaj diversmaniere subtenas SET Lančov. Inter tiuj estis vicprezidanto de Distrikta Nacia Komitato en Třebíč, estroj de Distrikta Komitato de Svazarm el Třebíč kaj Znojmo, reprezentantoj de la urbo Vranov nad Dyjí, sur kies teritorio situas la tendaro, reprezentantoj de pluaj lokaj organizaĵoj. Inter gastoj venis ankaŭ pluraj samideanoj, kiuj staris ĉe la komenco de la tendaroj en Lančov aŭ en pasinteco dum multaj jaroj aktive partoprenis ĝian efektivigon kaj nun pro diversaj kaŭzoj ne plu povas daŭrigi en tiu ĉi agado.

La longan historion de SET, ĝian kreskon, pliboniĝadon kaj ankaŭ ĝian signifon por la movado enlanda kaj ankaŭ eksterlanda skizis en sia alparolo prezidanto de EK Třebíč s-ano Fr. Pisk, kiu ankaŭ aprezis helpon, kiun la organizantoj de SET ricevas de ŝtataj institucioj kaj popolaj organizaĵoj. Al la plej meritplenaj subtenantoj kaj kunlaborantoj oni dankis per apartaj honordiplomoj. Sed la dankojn ricevis ankaŭ la organizantoj de SET, la EK Třebíč - tiujn de ĈEA, kaj de kelkaj Esperanto-kluboj eĉ unuopuloj.

Post la oficiala parto de la vespero okazis art-amuza programo, kiun preparis grupeto da tendaranoj kaj la muzika ensemblo "Barbuloj" el Prago.

vk





DUM SOLENAĴO NE MANKIS ANKAŬ INTERESA KULTURA PROGRAMO

# el fervojista movado

LA 34-a KONGRESO DE I F E F

Dum la 2-a ĝis 8-a de ĉi-jara majo okazis en Balatonfüred /Hungario/ jam la 34-a Kongreso de IFEF.

Kun 450 kongresanoj startis de Budapeŝto el sep vagonoj kaj restoracia vagono la aparta trajno kun la IFEF emblemo sur la lokomotivo. Ĉi tiu senpaga vojaĝo estis donaco de la Hungaraj Ŝtatfervojoj MÁV. Esperantaj flagoj flirtis, laŭtparolilo salutis esperantlingve la kongresanojn kaj la staciestro de Balatonfüred kun delegacio en fervojista uniformo kune kun la jam pli frue alvenintoj solene akceptis ilin.

La 3-an de majo la abunda programo komenciĝis. Je la 9,30-a horo viciĝis la fervojistoj en uniformo - 25 personoj el 17 landoj - laŭ la tradicioj de antaŭaj kongresoj. La salonon plenigis 300 kongresanoj, la aliaj sidiĝis en du apudaj salonoj, kie pere de grandaj ekranoj de la kolora kaj nigroblanka televidoj estis videbla tuta programo de la inaŭguro. La Kongreson partoprenis 605 delegitoj el 22 landoj nekalkulante gastojn kaj reprezentantojn de UEA, FISAIC, MÁV, Urba Konsilio, Sindikatoj, partio kaj diversaj organizaĵoj, kunlaborantaj kun IFEF.

El abunda programo de la Kongreso oni devas tuŝi almenaŭ kelkajn. La 4-an de majo je la 15-a horo la prezidanto de la Urba Konsilio István Rácz akceptis en la urba konsilia domo la estraron de IFEF, la estraron de LKK kaj la delegitojn de Landaj Fervojistaj Asocioj. Dum la kongresa semajno oni aranĝis por la kongresanoj du duontagajn, unu tuttagan kaj unu vesperan ekskursojn. En la 12-a etaĝo de la kongresa hotelo estis lokigita la urba amatora radio-stacio el Győr, kiu dum la tuta kongressemajno oficiale esperantlingve vokis la mondon kaj informis ĝin pri la IFEF-kongreso.

El la prelegoj plej multe vizitita estis la prelego de inĝ. István Gulyás, prez.de LKK: "La estonto de eŭropaj fervojoj kaj la rolo de Hungaraj Ŝtatfervojoj".

Dum la kultura vespero en tri salonoj la trihora distra programo estis tiel bunta kaj vigla, ke la aŭskultantaro eĉ ne observis, kiel rapide forflugis tiuj tri belaj horoj.

La venonta 35-a kongreso de IFEF okazos en Oostende /Belgio/ en la tagoj la 4-an ĝis 10-an de junio 1983.

J. Tomíšek



Solena parado de fervojistoj en uniformoj el 18 landoj en la kongresa halo antaŭ solena inaŭguro.

Co v příštím roce...

Na poslední schůzi výboru sekce byl projednán a schválen plán práce na příští rok s výhledem do příštích let. V plánu je připraveno několik zajímavých akcí nejen u nás, ale i v zahraničí. Bude mezi nimi 35. kongres IFEF v Belgii, 68. kongres esperantistů v Budapešti, účast na IFER v Lipsku a konference sekce, která se bude konat v září ve spolupráci s MS v Havlíčkově Brodě. Spolupracujeme i se slovenskou železničářskou sekcí, jejíž akcí se také zúčastníme.

Nechceme, aby činnost připravoval jen výbor sekce. Máme ve svazu několik místních skupin v železničářských kulturních zařízeních, kde by bylo možné připravit velmi zajímavé programy s železniční tematikou. Mezi železničáři jsou oblíbené např. historické vlaky při příležitosti jubilea určité trati, které přitahují hodně přátel železnice. Mohou to být i turistické pochody, různé zajímavé výstavy, setkání apod.

Sekce chce a má zájem o spolupráci s místními skupinami, zejména s těmi, kde jsou členové ŽS. Tyto společné akce jsou tou nejlepší formou činnosti nejen pro MS, sekce, ale i pro celý náš svaz. Budete-li připravovat něco zajímavého, obraťte se na výbor sekce. Velmi rádi vám pomůžeme.

-šp-

KONFERENCO DE LA FERVOJISTA SEKCIO EN G D R

Laŭ la antaŭinformo okazos en la tagoj 5-a - 7-a de novembro '82 proksime de la urbo KARL-MARX-STADT konferenco de fervojista sekcio de AE GDR. Niaj sekcianoj ĝustatempe ricevos detalajn informojn. Samtempe ni invitas aliajn interesulojn, kiuj deziru la aliĝilojn kaj informojn laŭ nia adreso.

šp

# Filatelistoj [KAJ] Esperanto

Kiel ni informis vin jam en STARTO 2/82, dum nia kongreso estis subskribita Pritrakta protokolo por la jaroj 1982-83 al la Interkonsento pri la kunlaboro inter la Asocio de ĉeĥaj filatelistoj kaj nia asocio. Kompletan tekston de tiu ĉi protokolo bv. legi pli malsupre.

Volonte ni atentigas ĉiujn esperantistojn - aktivajn filatelistojn aŭ tiujn, kiuj intencas estiĝi filatelistoj pri escepta kaj unika ebleco kunigi ambaŭ interesojn - filatelion kaj Esperanton.

La Asocio de ĉeĥaj filatelistoj startis novan agadon de sia Esperanto-sekcio ĉe Komisiono de tema filatelio. Vi certe estos sincere bonvenigita inter la fakuloj, kiuj helpos al vi per faka konsilo kaj ankaŭ vi eble iam enviciĝos inter konataj kaj jam famaj ekspoziciantoj, pri kiuj ni jam delonge fieras en la fako de Esp.temaro.

Ni prezentas al vi la komitaton, ĉe kiu bv. deziri informojn kiel vi povas estiĝi membro de nomita sekcio.



1/ Vladimír V á ň a, Revoluční 54, 312 02 PLZEŇ estas gvidanto de la sekcio. Li same gvidas la informan organon Zpravodaj /Informilo/, kiun la sekcio por sia membraro eldonas,
2/ Dolfa B a r t o š í k, Fráni Šrámka 31, 150 00 PRAHA 5 - Smíchov estas anstataŭanto de la sekcia gvidanto kaj redaktoro de la organo Zpravodaj,
3/ Ing. Pravoslav V a l n ý, Čs.armády 954, 500 02 HRADEC KRÁLOVÉ estas sekretario de la sekcio, kiu akceptas aliĝojn de novaj membroj, registras la membraron kaj prizorgas kutimajn sekretariajn laborojn,
4/ Alois J a k u b e c, tř. 1.Máje 1922, 753 01 HRANICE estas la kunredaktoro de Zpravodaj,
5/ Jaroslav V á ch a, Smetanova 225, 261 01 PŘÍBRAM zorgas pri grafikaĵoj kaj preso de Zpravodaj.

Ni rekomendas do al ĉiuj, precipe tamen al niaj junaj membroj bone pripensi kiel konvene kunigi ambaŭ interesojn. Ni supozas, ke pluraj pioniraj grupoj aŭ domoj de pioniroj tre bonvenigos vian emon labori kun infanoj kaj propagandi filatelion kaj Esperanton. Kaj en tiu sfero jam nun ni deziras al vi plenan sukceson.

PRITRAKTA PROTOKOLO por la jaroj 1982 - 1983 al la Interkonsento pri la kunlaboro inter Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Asocio de Ĉeĥaj Filatelistoj, kontraktita en Ostrava la 18-an de septembro 1976.

\- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

En la intereso de ĝusta plenumado kaj kontrolado de taskoj, kiujn Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Asocio de Ĉeĥaj Filatelistoj libervole akceptis en la supre indikita Interkonsento pri reciproka kunlaboro, akceptas ambaŭ interkonsentantaj subskribintoj jenan pritraktan protokolon por la jaroj 1982 - 1983.

Asocio de Ĉeĥaj Filatelistoj certigos

1/ ke la Komisiono de tema filatelio de AĈSF dediĉu al nova sekcia gvidantaro Esperanto KTF AĈSF ĉiuflankan kaj efikan helpon dum la restarigo kaj aktivigo de sekcia agado tiel, kiel la gvidantaro de la sekcio bezonos,
2/ alsendadon de ekspoziciaĵoj de membroj de la sekcio al internaciaj filateliaj ekspozicioj estantaj en la plano de AĈSF, se la ekspoziciaĵoj plenumos la kondiĉojn de la ekspozicia regularo de AĈSF. Ekspoziciaĵoj estos alsendataj en samaj tempospacoj kiel same kvalitaj ekspoziciaĵoj de ceteraj temaj sekcioj,
3/ subtenon de la petskribo de ĈEA pri pretigo de porokaza poŝtostampo okaze de la 125-jara jubileo de naskiĝo de aŭtoro de Esperanto D-ro Zamenhof en la jaro 1984,
4/ kiel parton de la jubileo de centjara ekzisto de Esperanto en la jaro 1987 ekspoziciigon de materialoj laŭ la temo Esperanto dum konvena ekspozicio aranĝita en la jaro 1987 en ČSSR kun la invito de samtemaj kolektantoj el socialismaj landoj,
5/ pere de la Komisiono de tema filatelio de AĈSF

a/ eldonadon de sekcia Informilo en la jaro 1982 2-3 n-rojn kaj ekde 1983 minimume 4 n-rojn jare, ĉiujn en minimume 8 paĝoj,
b/ en 1982 renkontiĝon de la sekcia gvidantaro kun invititaj

gastoj, en 1983 renkontiĝon de membroj de la sekcio dum konvena okazo,

c/ kunlaboron de la sekcio kun Internacia klubo de temaj kolektantoj AREK /interŝanĝo de spertoj, informoj, artikoloj/,

d/ eldonadon de la katalogo de tutaĵoj je temo Esperanto kiel helpilon por samtemaj kolektantoj,

e/ propagandon de Esperanto kaj de agado de la sekcio per speciala artikolo en la revuo Filatelie,

f/ prelegon "Esperanto en filatelio" dum la renkontiĝo de sekcia membraro en la jaro 1983,

g/ kreo de du novaj ekspoziciaj kolektoj je temo Esperanto kaj ilian ekspoziciigon dum regiona ekspozicio,

h/ publikigon de teksto de tiu ĉi protokolo post ĝia aprobo en Zpravodaj /Informilo/ de la sekcio kaj en la asocia revuo Filatelie.

Ĉeĥa Esperanto - Asocio

1/ publikigos en la asocia revuo Starto artikolon pri la renovigita agado de la sekcio kaj popularigo de ĝia agado kun alvoko pri varbado de novaj membroj,

2/ en la revuo Starto publikigos artikolojn pri filatelio kaj agado de la sekcio Esperanto en KTF AĈSF,

3/ pere de la Junulara sekcio de ĈEA strebos pri propagando de filatelio inter junaj homoj,

4/ al membroj de la sekcio laŭbezone proponos fakajn helpojn kaj konsultigojn pri la historio de Esperanto kaj de planlingvoj ĝenerale, helpos al ili dum kreado kaj kvalitigo de ekspoziciaĵoj je la temo Esperanto,

5/ partoprenos pagokovron de elspezoj ligitaj al eldonado, presado kaj distribuado de Zpravodaj /Informilo/ de la sekcio. Por tiu celo ĝi disponigos al la sekcia gvidanto ĉiujare sumon de Kčs 1000,-, kies uzo devas esti regule fakturata kun koncernaj kontaj dokumentoj pri aĉeto de stencilmaterialo, papero, kovertoj kaj poŝtelspezoj kun kontraktoj pri farendaĵoj /ekz.skribado kaj prespretigo de Zpravodaj /Informilo/ ks.,

6/ sufiĉe frutempe petskribos la Federacian ministerion de PTT /komunikiloj/ pri la pretigo de porokaza poŝta stampo okaze de la 125-jara jubileo de naskiĝo de aŭtoro de Esperanto D-ro Zamenhof en la jaro 1984,

7/ sufiĉe frutempe petskribos la Federacian ministerion de PTT /komunikiloj/ pri eldono de poŝtvaloraĵoj /poŝtmarko, tutaĵo, porokaza poŝtstampo/ okaze de la centjara jubileo de ekzisto de Esperanto en la jaro 1987,


8/ ekspozicion de laŭtema ekspozicia materialo Esperanto en Ĉeĥoslovakio okaze de la centjara jubileo de ekzisto de Esperanto en la jaro 1987, el siaj financaj rimedoj certigos per konvenaj materiaj premioj por premiigi la plej belajn tiatemajn ekspoziciaĵojn,

9/ post la aprobo publikigos tekston de tiu ĉi protokolo en la asocia revuo Starto.

En Pardubice la 20-an de marto 1982

| Ĉeĥa Esperanto - Asocio | Asocio de Ĉeĥaj Filatelistoj |
| --- | --- |
| subskribita | subskribita |
| D-ro Jaromír J e r m á ř, p.m. | Vladimír V á ň a, p.m. |






VD TVAR Pardubice je monopolním výrobcem sportovních ochranných přileb značka CASSIDA. Tyto přilby obdržíte v prodejnách Domácích potřeb, Drobného zboží a Mototechny.

Zájemcům zašleme požadovaný typ přilby prostřednictvím našich služeb

TVAR VD
Jägermanova 1682
530 03 PARDUBICE

Výrobní družstvo ELKO Nový Knín oslavilo v loňském roce 30 let svého trvání. Kolektiv družstva za celou dobu od jeho založení se vždy čestně vyrovnával se stanovenými úkoly a nevykázal ani v jediném roce jejich nesplnění.

Po celou tuto dobu obohacuje náš trh širokým sortimentem užitečných výrobků pro domácnost, kutily, stavebníky a hlavně pro automobilisty.

Při jejich výrobě využívá družstvo nových poznatků a poptávky trhu, na jejichž základě výrobky neustále zdokonaluje, obměňuje a hlavně přichází s novými, které zlepšují nejen vzhled automobilů, ale jsou i nezbytnými pomocníky při opravách a údržbě.

V minulosti /dokud ještě nebyly předepsány/ zavedlo družstvo jako první výrobu zadních lapačů nečistot kol k vozům OCTAVIA, 1000 MB a Š 100. V současné době /kromě typu OCTAVIA/ ještě je vyrábí a k nim přibyly další, a to přední lapače pro vozy Š 105 a 120, vozy LADA a zadní lapače pro vozy LADA.

Jako dobrý pomocník pro přepravu různého nákladu v automobilu se osvědčil další výrobek, kterým je skládací vozík UNICAR. Pro svou skladnost a účelnost je výborným doplňkem každého vozu.

Pro pohodlí cestujících v automobilu je určena opěrka hlavy. Rovněž s tímto výrobkem bylo družstvo vůbec mezi prvními výrobci a o jeho oblibě svědčí ta skutečnost, že se opěrek vyrábí ročně 25 000 ks a že zájem trhu je stálý.


Při opravě automobilů a jejich součástí je skutečně nezbytným pomocníkem nový výrobek "stahovák brzd. bubnů SR 1" a "univerzální stahovák SR 2". Tyto výrobky byly zařazeny též do výrobního programu družstva v r. 1981/82. Stahovák brzd. bubnů SR 1 je určen pro vozy ŠKODA všech typů a univerzální stahovák SR 2 je potřebný pro dílny i kutily na demontáž řemenic, ložisek a ozubených kol všech typů vozů. Také zarážecí autoklíny jsou levným a velice prospěšným pomocníkem při opravě vozu hlavně v terénu.

Všechny vyjmenované výrobky slouží majitelům vozů při provozu a běžné provozní údržbě, ale nesmíme zapomenout ani na výrobky, které sloužily ke zlepšení vzhledu a zároveň byly i praktické. Družstvo bylo v minulých létech jediným dodavatelem ochr. krytů kol pro vozy ŠKODA 1000 MB a v současné době vyrábí ochr. kryty kol SPRINT pro vozy ŠKODA s diskem 13" i 14" a pro vozy VAZ.

V neposlední řadě přispívá v.d. ELKO i pro vybavení garáží, a to novým výrobkem "sklápěcí kovové věšáky VISA". Ty jsou určeny např. pro zavěšení pneumatik, různého nářadí a jiných dalších předmětů, které se v garáži vyskytují.

Pro vozy ŠKODA Š 105 a 120 je též družstvo subdodavatelem AZNP, kterému dodává ozdobné lišty a na export vyrábí a vyváží lapače nečistot BMW.

Většinu těchto výrobků obdrží spotřebitel v obchodní síti státního a družstevního obchodu. S celým sortimentem se však mohou zájemci seznámit v podnikové prodejně ELKO, Praha 2, Francouzská 20, kde jim je prodavačky ochotně předvedou a kde si mohou výrobky také objednat na dobírku zásilkovou službou.





Produkta kooperativo ZNAK Hradec Králové aĉetas jenajn plumarspecojn:

plumaron de ora fazano
plumaron de perdriko
plumaron de numido
kokajn kurtenetojn surkolajn

Prezo de plumaro estos fiksita post la unira kontrolo en la produkta kooperativo ZNAK Hradec Králové. La aĉetsumon ni sendas perpoŝte. Plumaron sendu lau la adreso

ZNAK výrobní družstvo,
Pražská 686/501 01 Hradec Králové

## ni recenzas



**Grava recenzo pri "EL SUBAJ FONTOJ" de Eli URBANOVÁ**

Sub la titolo Dua poemaro de Urbanová publikigis L.H.Knoedl el Brazilo en junia n-ro de la revuo Esperanto, eldonata en nederlanda Rotterdamo, interesan recenzon, kiu meritas nian atenton. Pro ĝia graveco ni represas la tekston en plena versio:

Nur nun post 21 jaroj denove aperas poemkolekto de Eli Urbanová. Kiel implicas la titolo, escepte de la versa rakonto "Imagu – tigro!", la poemoj ĉiam esprimas iun tre internan travivaĵon aŭ spertitan senton aŭ penson dum diversaj epokoj de la vivo de la aŭtorino. Tiel "Ombroj de la estinteco" entenas kelkajn epizodojn de ŝia instruistina periodo, sed konstante traplektitajn per ŝiaj samtempaj enmemigoj, atestantaj riĉan internan vivon. "Abismo de ekkono" kunigas kaj malkaŝas tre intimajn sentojn, kiuj la aŭtorinon mem mirigas kaj timigas. La tria parto "Ringo" enhavas poemojn de nova fazo, iom pli bela ol la antaŭaj. En "Herooj de la zodiako" ŝatantoj de astrologio – kiel ĉiam okazas pri horoskopoj – trovos iun eron ĝuste aplikeblan. La fina parto, "Hinda suito", komenciĝas per "Ĉis ni eliros el grenejo!", kiu sub la preteksto de fabelrakontado rivelas unu el la raraj momentoj de gajeco de la libro, kiel ekzemple la admona interrompo de la rakontantino al la kunulo: Kara, ni estas sur la strato! La finalo "Triopo" estas iom mistika, kvankam travideblas ia sublimiĝo de la antaŭaj, kelkfoje amaraj, kelkfoje tristaj, nur tre malofte ĝojaj sentoj troveblaj en la kolekto.

Min persone ĝenas preseraroj. Krom la tie notitaj troveblas pliaj en la teksto. Ne nur en ĉi tiu, sed en preskaŭ ĉiuj Esperantaj libroj, afero facile kaj preskaŭ totale eliminebla. La prezento de la libro estas modesta, sed tamen plaĉa. Foto de la aŭtorino /ne nur bela, sed ankaŭ simpatia/, ŝia biografieto kaj modernaj, trafaj ilustraĵoj, kies aŭtoro ne estas menciita.

Dezirindus multe pli da orienteŭropaj eldonaĵoj kiel ĉi tiu por ebligi rektan interŝanĝon inter eldonejoj kaj akiron de pli da libroj fare de legantoj kun transpagaj malfacilaĵoj".–

Per ĉi tiuj vortoj estas akceptita kaj taksata la nova poemkolekto de nia ĉeĥa poetino – esperantistino Eli Urbanová en la mondo. Nur unu klarigo restas de ni aldoninda: La misatente ne menciita aŭtoro de tiuj laŭditaj "trafaj" ilustraĵoj estas nia konata kunlaboranto Milan Labašta.

-jr-

Eldonis ČEA 1981, 95 pĝ., ilustrita, prezo Kčs 16,–.

Albumo SACHSENHAUSEN - tekstoj, dokumentoj kaj bildmaterialo pri la iama koncentrejo. Redaktis Eduard Ullmann, grafika aranĝo Annemarie Toberentz. Formato 11 x 21 cm, kreta papero, senmanka lingvaĵo.

Stile kovrilita broŝuro sur 32 paĝoj informas la leganton pri la kruelaĵoj kaj brutalaĵoj tekste kaj bilde en tiu ĉi trista loko. Eldonejo kaj prezo ne indikitaj.

-jelĉ-

LUKTO KONTRAŬ LA ANALFABETECO - Vjetnamaj spertoj. Fremdlingva eldonejo Hanojo, 1981, 45 paĝoj, formato 15 x 23 cm.

La 2-an de septembro 1945 naskiĝas la Demokratia Respubliko Vjetnamio kaj la sekvan tagon la Provizora Registara Konsilantaro sub gvido de prezidento Ho Chi Minh klasas tuj post la lukto kontraŭ la malsatego /du milionoj da viktimoj/ tiun kontraŭ la analfabeteco en la ses taskoj konsiderataj kiel antaŭece gravaj. Popolleviĝo, revolucio kaj militoj tamen profunde signis ĉiujn plenumendajn taskojn. Lando dum jaroj trairas nepriskribeblajn malfacilaĵojn de kolonio, liberiĝita lando, lando en militoj, lando dividita, naturaj malfeliĉoj furiozas, ekonomiaj kaj socipolitikaj problemoj grandegas. Kaj tamen de tempo kiam lernejo estis nealirebla lukso, la norda parto de la lando likvidas la analfabetecon en 1958 kaj dudek jarojn pli poste la sudo, kvankam gravaj problemoj speciale en malfacile alireblaj regionoj ekzistas ankoraŭ nun...

Multaj por ni preskaŭ nekonataj indikoj en bona lingvo, rekomendinda legaĵo pri spertoj kaj travivaĵoj de vjetnamoj.

-jelĉ-

Petra Radenkova: GEORGO DIMITROV. Konciza biografio. El la bulgara tradukis Nikola Aleksiev. Eldonis Sofia-Pres 1982. Paĝoj 68, formato 19,5 x 12,5 cm, ilustrita per 16 tutpaĝaj fotoj. Kartonita, prezo ne indikita. En koncizigo antaŭ ni defilas la vivo kaj verko de la fama personeco de revoluciulo G. Dimitrov. Ekde infanaĝo ni sekvas lin tra junaĝo kaj liaj aktivadoj en la bataloj de la bulgara laborista kaj proleta luktado. Ni legas pri persekutoj, arestadoj, pri lia idea - politika formiĝo kaj daŭra sinklerigado. Devinte 1923 forlasi sian patrujon li troveblas en vicoj de komunistaj aktivuloj de diversaj landoj de Eŭropo ĝis la glora proceso en Leipcigo, kiam li sentime kaj sagace refutis la akuzojn kaj fitrompojn de la hitlera tribunalo. Savita en la faŝisma karcero per la ricevita soveta ŝtataneco, li ekstaras dank' al siaj elstaraj kapabloj sur posteno plej alta kiel ĝenerala sekretario de Kominterno ĝis ties likvidiĝo 1943. Post la milito li revenas post 22-jara foresto en sian patrujon. Li gvidas la landon en la plej malfacilaj postmilitaj jaroj al seniĝo je la monarkia kaj burĝa katenoj kaj metas per sia saĝa kaj aprezata politiko fundamentojn de la ekonomia kaj kultura disfloro de PRB.

La verketo instrua kaj leginda estas ankaŭ lingve senriproĉa kaj kun nemultaj preseraroj. Mi povas ĝin rekomendi.

Jiří Kořínek



"infanoj de la mondo". Ideo kaj teksto: Grethe H. Mathismoen, desegnaĵoj: Eli Bø kaj B. Giset /ambaŭ 14-jaraj/. Eld. Dana UN-ICEF Komitato, 1979, okaze de la Internacia Jaro de la infano. /Nin ĝi atingis nun/. 32 plus 4 p., 30 x 21 cm. Dika papero.

La kajero, en kiu estas pli da koloraj desegnaĵoj, ol da teksto, rakontas al la infanoj, precipe al la pli etaj, pri la infanoj de la mondo, spektataj de infanaj okuloj, pri iliaj ĝojoj, en certaj landoj, kaj pri iliaj malĝojoj aŭ eĉ suferoj, manko de vivobezonaĵoj en aliaj landoj. "Ĉiam estas io, kio estas nejusta. Kaj sub tio suferas la infanoj, kiuj estas sen kulpo. La nejusteco dolorigas... ni /do/ ne povas esti tute feliĉaj, se aliaj suferas... La homoj en ĉiuj landoj devas kunlabori, por ke la mondo fariĝu pli justa".

Ĉarma, simpatia publikaĵo, kun svarmantaj infanstilaj koloraj bildetoj kaj kun sentruda morala instruo. Simpla, senmanka lingvaĵo. /Ni ne posedas vendeblajn ekzemplerojn! Tiu recenza estas forsendita al denaska esperantisteto en Vladivostok./

JaMa.

## )Lingva angulo(

**DUDEKO DA FAKAJ VORTOJ POR PRAKTIKA UZO /6/ - el komputiko**

**adiciato - sčítanec, druhý sčítanec**

**datumoj - data /údaje/**

**datumo-transigo - přenos dat**

**dokumentaro pri datum-prilaboro - dokumentace zpracování dat**

**datum-vidigilo - zobrazovací jednotka, displej**

**inkrementa reprezento - přírůstkové zobrazení**

**integrita cirkvito - integrovaný obvod**

**karaktro - znak**

**komputiko - počítačová technika**

**komputilo /laŭ la terminologia centro de ISAE komputoro, laŭ PIV komputero, sed nepre evitinda!/ - počítač**

**minusato - menšenec**

**plusato - první sčítanec**

**rekursiva procedo /retroir-metoda/ - rekursivní postup**

**rikordaro - soubor**

**rikordo - věta, sdružená informace, záznam**

**specigi - třídit /např. děrné štítky/**

**storo de komputilo - paměť počítače**


**subtrahato - menšitel**

**trubendo - děrná páska /obv. papírová/**

**trukarto - děrný štítek**

**/we/**

# NI PREZENTAS NOVAN ESTRARON DE ĈEA


Dr.Jermář
prezidanto de CEA


Ing.V.Kočvara
1.vicprezidanto


V.Podhradská
2.vicprezidanto


Z.Křimský
sekretario


J.Novák
membro


S.Papírník
membro


F.Patera
membro

## PLUAJ MEMBROJ DE CK


E.Dadák


K.Franc


J.Kašparec


J.Klement


D.Kočvara


M.Malovec


F.Pisk


R.Linhart


P.Sittauer


MuDr.V.Škoda





Ing.Margit Turková


J.Vondráková


Ing.K.Janouš


M.Jupová


K.Madzia


F.Staněk


J.Vychodil

## MEMBROJ DE CKRK


L.Chytil

M.Oplerová


J.Patera


JuDr.Z.Rousín


M.Turková

# INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

VICA ĜENERALA SEKRETARIO PRI MALARMADO AKCEPTIS DELEGACION DE UEA

En ceremonio la 1-an de julio Universala Esperanto-Asocio kaj Bulgara Asocio pri Unuiĝintaj Nacioj komune prezentis petskribon pri malarmado al Unuiĝintaj Nacioj. La petskribo subskribita de 103 000 bulgaraj civitanoj, reprezentis la kontribuon de unu lando en tutmonda kampanjo.
La ĉefa organizanto de la subskribkolektado en Bulgario estis la Bulgara Esperantista Asocio.

ESPERANTO REPREZENTIĜAS DUM INFORMSESIOJ POR NROj

Unu el la multaj zorgoj de la Novjorka oficejo estas certigi ĉeeston de Esperanto en UN-informsesioj por neregistaraj organizoj /NROj/. La kunsidoj traktas aspektojn de la laboro de UN kaj vojojn al kunhelpo, kiujn povas sekvi NROj.
Inter la multaj sesioj estis sesioj pri energio, packonservado, la Asembleo pri Aĝiĝo, la Internacia Kortumo kaj la Konferenco de UN pri la Plej neevoluintaj Landoj. La Asocio ankaŭ kunlaboras en komitatoj de NROj pri aĝiĝo, pri homaj rajtoj kaj pri la paca utiligo de la kosmo.

NEKROLOGO: MARION /NEWELL/ LORIE, JOHN W. LEWINE.

Tiuj ĉi nomoj signifas grandan perdon al la Esperanto-Movado, speciale al la fako, kiu rilatas al UN. Ambaŭ estis anoj de la Laborgrupo ĉe UN kaj ambaŭ scipovis multajn lingvojn kaj uzis ilin profesie, kun emfazo sur Esperanto.

UEA EN UNUIĜINTAJ NACIOJ : NOVAĴOJ MALLONGE

: En novembro la Ĝenerala Asembleo de UN deklaris 1983 Monda Komunika Jaro. UEA planas aktive partopreni la aranĝon emfazante, ke la lingvoj estas la fundamento de komunikado. Prezenton de la starpunkto de UEA oni jam cirkuligis al ĉiuj UN-Ambasadoroj pere de la Novjorka oficejo.
: Estrarano de UEA Humphrey Tonkin estis invitita prelegi pri Esperanto ĉe lastatempa kunveno de la Virina Ligo de UN.
: "Estu senhezite certaj rilate nian daŭran interesiĝon pri la celo, al kiu vi strebas". Per tiuj vortoj Frank Machiarola, estro de la Fako pri Edukado de la urbo Novjorko, antaŭ nelonge dankis UEA pro ĝia subteno de festa kunveno de la fako, kiu okazis en la UN-sidejo okaze de la Semajno por Framdaj Lingvoj.
: La Laborgrupo de UEA ĉe Unesko estas iniciatinto kaj ĉefa rolanto en grava kolokvo de NROj okazonta en Parizo proksiman novembron. Unuavice koncentrite je la rilato inter komunika teknologio kaj kulturo, la kolokvo sendube traktos ankaŭ la lingvan problemon.
: La Monda Asembleo pri Aĝiĝo troviĝas inter la baldaŭaj UN-aranĝoj en Vieno, en kiuj UEA planas sian reprezentiĝon.



AKTIVECOJ DE LA PRAGA JUNULARO

La 31-an de majo okazis jarkunveno de la Junulara Sekcio ĉe EK Praha. Oni konstatis, ke dum la unua jaro de la nove fondita sekcio formiĝis grupo da fidelaj gejunuloj, kiuj formas bazan kernon de la sekcio. Dum la jaro la junularo preparis por la ceteraj klubanoj dufoje projekciadon de lumbildoj; sukcesa estis la Silvestra vespero kun aŭtentika rakontado pri eksterlandaj kristnaskaj kaj novjaraj kutimoj kaj specimenoj de interesa sportbranĉo karateo. En 1982 la junularo kunvenas regule ĉiun lastan lundon en monato. Unu el la plej sukcesaj programoj estis prelego de s-ano Haszprunár pri esperantistoj - radioamatoroj kun sonbendigita montraĵo de ilia interparolo en etero.

/Pečený/

SOLENAĴO OKAZE DE 80-JARA JUBILEO DE LA ESPERANTISTA KLUBO en P R A H A

La Esperantista Klubo en Praha estis fondita la 9-an de decembro 1902 - do ĉi-jare la klubo estos jam 80-jara. Por digne honori tiun ĉi jubileon la klubo aranĝos jubilean solenaĵon la 23-an de oktobro 1982 en Kultura domo Gong en Praha 9, Sokolovská 969. Antaŭtagmeze okazos solena kunveno, posttagmeze kultura programo, vespere komuna danco. Dimanĉe antaŭtagmeze okazos trarigardo de vidindaĵoj de Prago.
Interesuloj skribu al Esperanto-klub Praha, p.schr.1069
111 21 P r a h a 1

/Komitato de EKP/

LA INTERNACIA EKSPOZICIO DE INFANPENTRAĴOJ en H O Ř I C E v P.

Esperantistoj en Hořice v Podkrkonoší vere sukcesis per sia "EKSPOZICIO DE INFANPENTRAĴOJ EL KVIN KONTINENTOJ". Oni povas diri, ke centoj da horoj dediĉitaj al la prepara kaj organiza laboro donis pozitivan okulfrapan rezulton. Estis alsenditaj proksimume 700 infanaj pentraĵoj el 35 landoj de ĉiuj kontinentoj.
La solena malfermo okazis la 6-an de junio 1982. Partoprenis ĝin ĉiuj elstaraj reprezentantoj de la politika, ekonomia kaj kultura vivoj el la distrikto Jičín kaj el la urbo Hořice v P., gvidataj de la ĉefsekretario de la distrikta komitato de KPĈ.
Estis eldonitaj: unupaĝa informilo pri E-o en la ĉeĥa, la "katalogo de la ekspozicio" en la versioj ĉeĥa kaj E-a, ĉio en vere altnivela aranĝo.
La unuan semajnon vidis la ekspozicion jam pli ol mil vizitantoj! La ekspozicio estas pruntebla al aliaj kulturaj organizoj en Ĉeĥujo; preferataj estas tiuj, en kies kadro funkcias E-grupo, kiu estos pretata transpreni la necesan garantion super la pruntitaj pentraĵoj.

-zp-

## LA III-a PRINTEMPA SEMINARIO en MNICHOVO HRADIŠTĚ

okazis inter la 14-a - 16-a de majo 1982. Partoprenis ĝin 92 gesamideanoj, kiuj certe estis kontentaj. Paroligan 6-horan enkondukon sperte gvidis s-ano Václav Špůr el Doksy. Eva Seemanová krom la arta programo parolis pri malpli facilaj ĉapitroj de E-gramatiko. La poeto Jiří Karen prelegis pri Esperanto kaj poezio. Ankaŭ aliaj prelegoj firmigis la konojn de ĉeestantoj.

Du aŭtobusoj veturigis la partoprenintojn al Ještěd, botanika ĝardeno en Liberec kaj muzeo de Karolina Světlá en Český Dub. Bela vetero la ekskurson nur substrekis.

Jam nun oni preparlaboras la venontjaran seminarion!

60-a GERMANA ESPERANTO - KONGRESO en Münster allogis 238 esperantistojn el FRG kaj 18 aliaj landoj dum pentekosto. Tio estis la plej granda nombro ekde multaj jaroj, eble ĉar kadre de la Kongreso ankaŭ okazis la unua kunveno de reprezentantoj de diversaj E-asocioj por pridiskuti preparojn por la jubilea jaro '87a.

Dum la Kongreso d-ro Berman el Hamburg prezentis rezolucion, en kiu la Federacia registaro estas instigata kontribui al racia solvo de la lingva problemo.

GEA strečos ĉiujn fortojn por sukcesigi la UK en Augsburg 1985.

R.Fischer



ESPERANTO KLUBO "LA VERDA SONĜO" ĉe Kultura domo 2287000 G U L B E N E , Sovetunio aranĝos ekspozicion dum la vespero pri Ĉeĥoslovakio kaj tiacele petas alsendi diversajn ekspozicieblajn materialojn /ĵurnalojn, gazetojn, esperantaĵojn, insignojn, bildkartojn, turismajn prospektojn ktp./en ĉeĥa lingvo kaj en Esperanto.

Ĉiu sendinto ricevos specialan leteron kun subskriboj de la partoprenintoj kaj urban insignon.

# RONDETA VIVO

GOTTWALDOV - la 9-an de junio okazis amika kunveno de kursanoj, kiuj lernas en lingvaj kursoj ĉe uzina klubo SVIT-ZPS-RŘ. La aranĝon partoprenis ankaŭ 9 infanoj, kiuj lernas E sub gvido de s-ino J.Kadlečíková. La infanoj surprizis per belsonaj E-kantoj, poemoj kaj deklamado. Je la fino ili rikoltis grandan aplaŭdon de publiko kaj dankemon de organizantoj. La klubo forsendis 15 desegnaĵojn por la ekspozicio en Brazilo.

J.Mart.

ZNOJMO - EK aranĝis en junio lerteresperon, al kiu venis 42 leteroj el 10 landoj. S-ano Rotrekl parolis en baza lernejo pri E-o, ĝia signifo kaj utilo. Anonciĝis novaj interesatoj por kurso.

V.R.

OLOMOUC - Pasis 50 jaroj de la tago, kiam en parko de Olomouc okaze de la 5-a kongreso de ĉeĥoslovakaj Esperantistoj estis plantita kiel viva memorigilo Esperanto-arbo, antaŭ ĝi starigita granita memorŝtono kaj la plej proksima strato nomita je strato de D-ro L.L. Zamenhof. Ĉi tiun datrevenon rememoris Esperantistoj en Olomouc la 19-an de junio 1982 per solena kunveno en granda salono de tiea regiona muzeo. Pri la historio de la E - arbo prelegis inĝ. F. Svoboda, artprogramon prezentis Vira kantĥoro Haná, membrino de loka teatro Jana Kalinová kaj orgenmajstro St. Vrbík, per kies propra muzikkomponaĵo "Por paco" orgenludita la kunveno estis finita. Poste la partoprenintoj iris komune al la E - arbo kaj tie donis florbukedon al la memorŝtono por honorigi laboron de la pioniroj de E - movado en Olomouc.

Mo - Bl.

UHERSKÝ BROD - la 3-an de februaro '82 estis arangita prelego pri E kaj ĝia aŭtoro en hotelo Javořina. Geinstruistoj-pensiuloj, por kiuj la prelego estis destinita, estis vere kontentaj. Parolis s-ano Jan Tichoň, kiu al la publiko montris ankaŭ parton de sia kolekto, kiu estos instalita en la ejoj de la kastelo Nový Světlov post ĝia rekonstruo. Dankinda laboro.

-oňja-

**KORESPONDI DEZIRAS ANONCOJ**

Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turniĝu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Mi deziras interŝanĝi bildkartojn pri floroj, pri ĉefurboj de ĉiuj ŝtatoj en la mondo. Skribu al s-ano Vladimír Rotrekl, 669 02 Znojmo - Dobšice 297

29.jara oficisto kor.tutmonde pri ĉ.t. kaj interŝ. BK. S-ano Vladimír Girba, ul.28 ijunja 49 - 1 FLOREŠTY Sovetunio 279800.

Gintaras Žiaunys, Žemaitijos 9-25, 235500 MAŽEIKIAI - Litovio, USSR kolektas PM,PK,esperantaĵojn kaj sondiskojn

Kun knabino el ČSSR kor. 21-jara Péter Makai, 5000 SZOLNOK, Bokányi, D 22 Hungario

39-jara instruisto deziras korespondi kun ĉeĥoslovakaj geesperantistoj: Didarević H. JUSUF 72000 ZENICA, škola Arnauti, Jugoslavio.

INVITILO - La přerovaj esperantistoj, membroj de EK ĉe UK RSM Přerovaj Maŝinfabrikoj organizis dum tagoj 16-a de aŭgusto ĝis 30-a de septembro ĉijara amplekSan ekspozicion "Pět let před stoletím" /Kvin jaroj antaŭ la jarcento/.

La ekspozicio en la nova kinejo larĝekrana "HVĚZDA" /La stelo/ estis organizita dediĉe al la solenaĵoj okaze de 95-a datreveno de eldono de la Unua libro kaj okaze de 60-jariĝo de la Esperanta movado en Přerov.

EK ĉe"ZK ROH Přerovské strojírny", Přerov.

ALVOKO - En GDR prepariĝas fondo de esperantista fakgrupo pri arbara mastrumado kaj forstscienco, kies celo estas apliki E por la menciitaj sciencoj kaj ellabori koncernan fakterminaron. Interesuloj el GDR kaj eksterlando pri la problemoj kaj kiuj estas pretaj kunlabori, skribu al d-ro Karl-Hermann Simon, DDR-1300 EBERSWALDE-FINOW, C.-v.-Ossietzky -Str. 21.

# GEORGI DIMITROV * 1882 * 1982

De la 5-a ĝis 6-a de junio 1982 Bulgara Esperanto-Asocio aranĝis en la ĉefurbo de Bulgario Sofio internacian scienc-praktikan konferencon okaze de la 100-jara jubileo de naskiĝo de la elstara reprezentanto de la bulgara kaj internacia laborista movado Georgi Dimitrov. Pri la signifo de Georgi Dimitrov la ĉefan referaĵon prezentis membro de la CK de BEA s-ano Petar Todorov. Pluajn kontribuojn, alproksimigantaj al la bulgaraj partoprenantoj agadon de la granda ŝtatestro en eksterlando, prezentis ekslaboranto de la Muzeo de Georgi Dimitrov en Lejpcigo kaj membro de la Centra Estraro de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR s-ano Jürgen Hamann kaj gvidanto de la Komisiono por Preso kaj Informado de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio Jaroslav Klement. La konferencon salutis ankaŭ D-ro Otto Haszpra, membro de CK de la Hungara Esperanto--Asocio kaj gvidanto de la Centrejo de UEA en Budapeŝto kaj s-ano Walter Żelazny, membro de CK de la Pola Esperanto-Asocio.

La konferenco okazis en kelkaj lokoj ligitaj kun la vivo kaj agado de Georgi Dimitrov. Ĝi komenciĝis en la Muzeo de Georgi Dimitrov en Sofio kaj venontan tagon ĝia kunsido okazis en la kulturdomo de la urbo Pernik. Pri komenco de la revolucia agado de Georgi Dimitrov la partoprenantojn alparolis k-do Ivan Draharski, sekretario por propagando kaj agitado de la departementa komitato de Bulgara Komunista Partio en Pernik. Lasta parto de la konferenco okazis en loka memordomo de Georgi Dimitrov en lia naskiĝvilaĝo Kovaĉevci.

La konferenco, kies parto estis ankaŭ bunta kultura programo enkadre de la Tagoj de Esperanto-Kulturo en Sofio, digne enviciĝis al aliaj aranĝoj preparitaj far komunistaj partioj kaj aliaj organizaĵoj en la socialismaj landoj okaze de la centjara jubileo de la naskiĝo de Georgi Dimitrov.

Jaroslav K l e m e n t,
gvidanto de la komisiono
por preso kaj informado de
Ĉeĥa Esperanto-Asocio

---

ĈIU, KIU ESTAS SUBTENANTO DE NIA MOVADO NE FORGESU, KE VIA MEMBRECO EN NIA ASOCIO ESTAS GRAVA KAJ DECIDA SUBTENO. JAM NUN VI TURNIĜU AL VIAJ LOKAJ GRUPOJ KAJ PETU - KE ILI AKCEPTU DE VI JARKOTIZON POR LA ESTONTA JARO 1 9 8 3 !!!.

ĈIU ESPERANTISTO EN Ĉ S R ESTU MEMBRO DE ĈEA , ĈIU ESPERANTISTO VARBU PLUAN NOVAN MEMBRON DE NIA ASOCIO. PLEJSUKCESAN MEMBRON/INON/ NI REKOMPENCOS PERE DE VALORA IMPORTITA LIBRO.

---



# KRONIKO

En julio 1982 forlasis niajn vicojn ege ŝatata s-ro Antonín P a v l í n, diplomito pri sociologio, plurjara membro de ĈEA kaj de EK en Brno. Same en julio 1982 foriris de ni s-ano D-ro Jan P o d r a c k ý, multjara membro de ĈEA kaj de EK en Brno, homo ege respektata. Ni havu ilin en nia dankema memoro. Ambaŭ familioj akceptu niajn profundajn kondolencesprimojn.

En Hlusovice /Bohuňovice/ mortis nia fidela ĝisviva membro s-ano Bohuslav N o v o t n ý. Al la postrestintoj ni esprimas sinceran kunsenton en ilia doloro.

Al esperantista familio de inĝ. Š í m a el Kralupy n.Vlt. foriris neatendite la dujara fileto Jindřich, kiu kelkfoje kun sia patrino vizitis la grupan kunsidon en Mělník. Ni kompreनas la grandan doloron de la gepatroj.

Antaŭ nelonge -la 29-an de julio festis konata kaj meritplena esperantistino, nia membrino s-ino Marie BARTOVSKÁ el Frýdek Místek rondan vivjubileon. Iom malfrue ni gratulas al ŝi kaj deziras multajn pluajn jarojn en firma sano kaj bonfarto.

## DARY

S-ano Jan Tichoň el Bojkovice subtenis la asocian kason per la sumo de Kčs 35,-. Li-pensiulo-akceptu niajn dankesprimojn.

Plue ni dankas al Esperanto Klubo Plzeň/ 105,-Kčs/ kaj al Marie Skořepová, Ostrava / 100,-Kčs/.

---

# NIA KONKURSO
## 10x RESPONDU

Ni vidas el respondoj, kiuj bedaŭrinde estas nur kelkaj, ke nia konkurso estas por vi tro peza. Tial ni jam de ĉi tiu numero ne prokrastos en ĝi. Bedaŭrinde ankaŭ nun ni ne ricevis gustajn respondojn de neniu kiu skribis al ni kaj respondis je demandoj el numeroj 2 kaj 3/82. Sube ni notas gustajn respondojn laŭ niaj fontoj kaj petas vin pro eraro kun dato de Zamenhof/ ĝuste 15.12.1987/:

Starto 2/82

1. Vieno, en 1912, Hungaro A. Marich
2. verda flago, supre maldekstre verda stelo en blanka kvadrato
3. pli ol 500
4. 36
5. 1908
6. 668
7. akcepto de la Deklaracio pri Esperanto, entenanta la principon de nesanĝebleco de la Fundamento de Esperanto ,

fondo de la lingva Komitato havanta taskon "konsiliĝi" pri demandoj, rilataj al lingvo,
sterigo de speciala Komitato por organizo de sekvontaj kongresoj

8. L. Privat
9. Ekzemple :"Mia penso", " Ho mia kor", "Preĝo sub la verda standardo", " Pluvo", " La espero", " Lavojo", " Al fratoj" k.a.

10. 1905, en angla.

Starto 3/82

1. Pavel Polnický
2. 16,5 milionoj el 76 landoj
3. En Sovetio, 1925
4. Nieuwe Binnenveg 179, ROTTERDAM, Nederlando
5. 1970
6. La 6-an de septembro 1953 en Aŭstrio
7. aprilo 1923, Venecio
8. Sekcio por kunlaboro kun MEM
   Sekcio fervojista
   Sekcio scienc-teknika
   Sekcio junulara
   Pedagogia sekcio
   Sekcio de blinduloj
   Medicinista sekcio
   Literatur-arta sekcio
9. A. Grabovski
10. 1902

---

GRAVA ATENTIGO

Pro la gravaj personaj problemoj en nia sekretariejo ni atentigas ĉiujn abonantojn de esperantaj gazetoj, ke ni de la nova jaro ne kapablos distribui ilin. Ĉefe nun temas pri gazeto DIA REGNO. Se inter vi estos homo,kiu volus okupiĝi pri la distribuado/temas pri libervola nepagita laboro/ skribu tuj al ni. Alimaniere ni devas de la nova jaro rezigni ankaŭ pri distribuado de ĉi tiu gazeto.

---

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Odpovědným redaktorem Zdenko Křimský. Grafická úprava Milan Lebašta. Fotografie Z.Křimský, J.Fischer,archiv.Kresby Pavel Rak.Tisk zajišzuje Technické ústředí knihoven Praha.Předáno do tisku 30.8.1982. Dohlecací pošta Praha 07.Snížený poplatek za poštovné povolen Ředitelstvím pošt Praha pod č.jed. P/1-1267 ze dne 6.4.1979.

STARTO - presorgano de ĈEA, Jilská 10, 110 01 Praha 1,Aperas 6 foje jare,jarabono 24 Kčs aŭ 10,50 gld. Mendi eblas ĉe niaj perantoj aŭ ĉe UEA same kiel anoncojn en nia gazeto.Respondas redaktoro Z.Křimský. Transdonita al presejo 30.8.1982.



KDS Sedlčany

KVALITAJ TRANĈ-PRODUKTOJ


Kuirejaj kaj viandistaj tranĉiloj
ĝardenistaj tondiloj de diversaj tipoj
tondiloj por la kureja prilaboro de kortbirdoj
higiena ilaro - ungo-fajliletoj
- raspiletoj por la malmola haŭto

Fabrikas KDS SEDLČANY ĈSSR
Eksportas MERKURIA Praha

# nákladní automobily AVIA

podvozky
valníky
účelové nástavby

■ moderní koncepce a konstrukce ■ elegantní vzhled ■ hospodárný provoz ■ účelovost



PRAHA 9 - LETŇANY
zavody - Brno, Ivančice, Žilina